

Heinrich Heine,
En la mirida bela Maj’

tradukita de Kálmán Kalocsay

En la mirinda bela Maj’,
dum sin burĝonoj fendis,
en mia kor’ la amon
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj’,
dum birda tril’ ne ĉesis,
al ŝi sopiron mian
konfide mi konfessis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 – †1976).*

Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)

Heinrich Heine,
En dolĉega Maj’

tradukita de Friedrich Pillath

Printempe en dolĉega Maj’,
Dum la burĝonoj krevis,
El mia koro ĝerme
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega Maj’,
Dum birda kanto sonis,
De l’ kora mi sopiro
Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).*

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

*Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poe-
moj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich
Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La
origina germana-lingva versio troviĝas
en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Li-
rika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.
Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipe-
dian retejon [http://eo.wikipedia.
org/wiki/Friedrich_Pillath](http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath).*

Heinrich Heine,
En , admirinde bela
maj’

tradukita de Hans-Georg Kaiser

En admirinde bela maj’,
dum jam burĝonoj krevis,
jen ankaŭ miakore
la amo sin eklevis.

En admirinde bela maj’,
dum birdotril’ senbridis,
jen mi al ŝi sopirojn,
dezirojn, ekkonfidis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-203-431 (2004-03-24 07:33:04)

*La poemo troviĝas en la „Libro de
la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“
(1822 - 1823), n-ro I. La traduko estas
korektita laŭ la lasta ŝanĝo, kiun faris
s-ro Hans-Georg Kaiser en 2004-03-
21.*

Heinrich Heine,
Im Mai

Im wunderschönen Monat Mai,
Als alle Knospen sprangen,
Da ist in meinem Herzen
Die Liebe aufgegangen.

Im wunderschönen Monat Mai,
Als alle Vöglein sangen,
Da hab’ ich ihr gestanden
Mein Sehnen und Verlangen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas
HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-
17).*

Arg-203-402 (2004-03-24 07:28:07)

*Das Gedicht befindet sich in Heinrich Heines
Werk „Buch der Lieder“, im Abschnitt „Lyri-
sches Intermezzo“, Nr. I.*